

Esperanto-Konferenco – 2016

16 - 22.07.2016.

en urbo Osijek, orienta Kroatio

Temo: Landoj ĉe vojkruciĝo

Organizanto: ORBIS PICTUS de Viŝnja Branković, Trieste, Italio - orbispictus@iol.it
portebraj telefonoj: +39/327 98 300 86 (IT) kaj + 385 / 99 50 11 912 (HR)
Loka poŝtadreso: Viŝnja Branković, Vijenac I. Mestrovica 49, 31000 Osijek, Kroatio

Konstanta adreso: Eric Laubacher, kasisto de OSIEK
8 avenue Jean Casale, F-78390 Bois d'Arcy, Francio
tel: +33 9 50 49 71 40 retadreso: kasisto@osiek.org

..... - **OSIEK - OSIEK - KONFERENCO - OSIEK - OSIEK -** finfine en
- **OSIJEK - OSIJEK - OSIJEK - OSIJEK !!!**

kandidato por Eŭropa ĉefurbo de kulturo en la jaro 2020

je 35 km de Serbio, 50 km de Hungario, 100 km de Bosnio kaj Hercegovino !!!

je 170 km de Beogrado, 260 km de Budapeŝto, 270 km de Zagrebo, 300 km de Sarajevo



Ĉiutagaj prelegoj kaj debatoj kun, interalie:

Maria Butan, RO / Georgi Mihalkov (Julian Modest), BG / Spomenka Ŝtimec, HR/ Zlatko Tiŝljar, HR/SI
Libroservo - voĉdonado por OSIEK-premio 2016 - E-kursoj - kulturaj programeroj
posttagmezaj vizitoj kaj ekskursetoj, unu tuttaga ekskurso
bona internacia etoso de negranda aranĝo ☺ infanvartejo ☺ diversaj loĝeblecoj

Antaŭkonferenco: restado en termalbanejo Harkány en Hungario (ĉ.60 km de Osijek)

kun vizitoj al Pécs kaj regiono de akvo, vino kaj kasteloj... 1-2-3 ... tagoj, laŭdezire

Postkonferenco: kunvojaĝo al la 101-a UK en Nitra, ĝemelurbo de Osijek !

alternative: restado en Osijek kun kompletigo de vizitoj tra Slavonio (HR) kaj Vojvodina (RS)

Programo de IEK 2016

Strukturo: *antaŭtagmeze* okazos po du prelegoj kun diskuteblecoj.

Krom la pritemaj, okazos ankaŭ prelegoj pri la gastigantaj urbo-regiono-lando kaj unu el la Aspektoj de Esperanto-kulturo.

La posttagmeza programo kombinos temon, ripozon, distron kaj turismon.

Vesperoj estos dediĉitaj al kulturo, amuzo, gastronomio, festado kaj "beĉarumado" !!! ...

Tema programo: "Landoj ĉe vojkruciĝo" - pri ĝi prelegos Maria Butan (RO), Georgi Mihalkov (BG), Spomenka Štimec (HR), Zlatko Tišljar (HR/SI) kaj aliaj (konfirmotaj)

Statuta programo: ĝenerala asembleo de OSIEK, voĉdonado por OSIEK-premio.

Distro, kulturo kaj edukado : *riĉa libroservo, porkomencanta kaj konversacia kursoj de Esperanto, Kroata eksprese, Osijeka eksprese, infanvartejo / ludejo / kursejo ...*

Turismo kaj ekskurseblecoj: de Osijek eblas ekskursi al plej diversaj ekskursceloj, ekde la proksimaj Kopački rit (la lasta "eŭropa Amazonio", 12 km), termalbanejo Bizovac (17 km), la famaj slavoniaj arbaroj, al la vilaĝoj aŭ proksimaj urboj Vukovar, Djakovo, Valpovo, Belišće (20 - 40 km), ĝis ekz. Sombor aŭ Novi Sad (80 - 100 km, en Vojvodina, Serbio), Mohács kaj Pécs en Hungario (60 /90 km).

La ĉefa tuttaga ekskurso estas planata per aparta aŭtobuso, dum la aliajn ni faros per propraj aŭtomobiloj kaj la publikaj transportiloj.

La konferenca urbo Osijek

Kun ĉ.110.000 enloĝantoj estas unu el la kvar plej grandaj kaj gravaj urboj en Kroatio (post Zagrebo, Rijeka, Split) kaj la ĉefurbo de ĝia plej orienta regiono, ebena, agrikultura Slavonio.

La urbo etendiĝas laŭlonge de la dekstra bordo de rivero Drava kiu je 25 km oriente, ĉe vilaĝo Aljmaš enfluas Danubon. Osijek plenas je vastaj ĝardenoj, parkoj, aleoj, promenejoj, biciklaj vojoj... pro kio ĝi ricevis multajn priekologiajn premiojn je enlanda kaj internacia niveloj. La plej longa kaj populara promenejo estas "Promenada" kiu etendiĝas laŭlonge de ambaŭ riverbordoj. Okcidente en la maldekstra riverbordo (preskaŭ neloĝata) situas vasta zoologia ĝardeno, kaj meze troviĝas la naĝkomplekso "Copacabana". De ĝi belas panoramrigardo al la vidalvida, la plej turisma urbokvartalo, la baroka Tvrdja (Fortikejo), aktuale kandidato por la UNESKO-listo de monda heredaĵo. Okcidente de Tvrdja troviĝas Gornji grad (La Supra urbo) kun la gotika preĝejo, simbolo de Osijek, "jugendstilaj" Eŭropa Avenuo, HNK (Kroata Popola Teatro) kaj modernaj loĝ-komercaj kvartaloj. Je orienta flanko situas Donji grad (La malsupra urbo), miksaĵo de trankvila memsufiĉa urbo kun ioma vilaĝeca etoso, moderna kvartalo kaj malnovaj fabrikoj.

Dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj Osijek estis grava metia, komerca kaj industria urbo. Nun, kun la dummilita (1991) kaj postmilita malprogreso, kiel universitata centro kun ĉ. 20.000 studentoj ĝi serĉas siajn novajn vojojn tra informadiko, scienco, kulturo, entreprenado...

Ĝi estas kandidato por **Eŭropa ĉefurbo de kulturo** en la jaro 2020.

Antaŭkonferenco / Postkonferenco:

Antaŭkonferenco - flekseble, depende de viaj alveneblecoj en la regiono vi povus resti de

1 tago ĝis 1 semajno en termalbanejo Harkány (HU), ripozante aŭ / kaj aktive ekskursante, memstare aŭ mendante la ekskursojn, laŭ via intereso, bone kontrolante viajn elspezojn.

Postkonferenco: ni kunkaravanos per komuna aŭtobuso kaj propraj aŭtomobiloj al la 101-a UK en Nitra, la ĝemelurbo de Osijek tra Pécs (la alia ĝemelurbo) kaj Budapeŝto (sume 400 km).

Ciuj konferencanoj havos rabaton por la aŭtobuso kaj aliajn avantaĝojn por la loĝado, ekskursoj, manĝoj... kun Orbis Pictus en Nitra.

Loĝado, konferencejo kaj manĝeblecoj

Ni loĝos kaj konferencos samloke, en nova, komforta kaj agrabla **3-stela hotelo Millennium**. (Kralja Petra Svačića 12, Osijek, www.hotel-millennium.hr).

Ĝi situas meze de la longa urbo, tiel ke la tri ĉefaj urbopartoj de ĝi atingeblas per 10 - 20 - minutaj promenoj. La aŭtobusa kaj trama haltejoj estas tre proksimaj (de kelkdek ĝis kelkcent metroj). Temas pri negranda familia hotelo, kun 19 ĉambroj, tiel ke dumkonferenco ni klopodas esti ĝiaj solaj gastoj.

La ĉambroj estas kun unu ĝis tri litoj, ĉiuj kun propra banejo, harsekigilo, klimatizilo, telefono, televidilo, sekurŝranko, sendrata kaj senpaga retaliro. Plej granda parto da ili havas ankaŭ fridujeton kaj balkonon.

La hotelo enhavas restoracion kaj kafejon kun somera teraso, kunvenejon, lifton.

Ĝi ofertas ankaŭ servon en la ĉambro kaj vestaĵlavado.

Manĝoj: al la loĝantoj de la hotelo ni konsilas mendi tie duonpensionon kio estas la plej praktika, plej bonpreza kaj plej bonetosa solvo. Ĝi ankaŭ ebligas postprelegajn kunestadojn dum la komuna tagmanĝo.

Prezoj por persono /nokto

en 2-3 litaj ĉambroj:

30,00 € HB, duonpensiono inkluzivas: tranokton, matenmanĝon, tagmanĝon

25,00 € BB, tranokto kun matenmanĝo / 20,00 € B, nur tranokto

en 1- lita ĉambro:

40,00 € HB, duonpensiono 35,00 € BB, tranokto kun matenmanĝo / 32,00 € B nur tranokto

Ĉiuj prezoj inkluzivas ankaŭ: turisman imposton kaj asekuron dum la restado en la hotelo

Por *vespermanĝoj* ni konsilas libere elekti lokojn kaj horojn por gustumi specialaĵojn en la urbo, aŭ diversloke dum komunaj aŭ individuaj ekskursoj.

Prenoĉiŝte Talas / Tranoktejo "Talas" (La Ondo)

Josipa Reihla Kira 14, Osijek (www.prenocistetalas.com)

Al la konferencanoj kiuj volas pli ŝpari rilate la loĝadon kaj la manĝoj ni rekomendas tiun tranoktejon kiu situas je 5 -10 minutoj piede (unu bushaltejo) de la konferencejo. Ĝi estas tute nova, ĉ. dujara, simpla, sed komforta gastejo. Proksime al ĝi situas panbakejoj, kafejoj, vendejoj kaj grandmagazena komplekso kun diverstipaj vendejoj, inkluzive grandan mem-servan nutraĵmagazenon. La loko kaj la ĉirkaŭaĵo estas trankvilaj, ĉiuj ĉambroj (nur 7) rigardas al la korto kaj situas teretaĝe aŭ je la unua etaĝo. La ĉambroj estas por 2 - 3 personoj, havas proprajn banejojn kun bankuvo, po du lavujoj kun speguloj, harsekigilo, viŝtukoj, klimatizilo, televidilo, senpaga sendrata retaliro, tablo, moderna meblaro..

La propra parkejo estas senpaga, kun videokontrolo.

Prezoj por persono / nokto en 3 - 2 - 1 - litaj ĉambroj : 13,00 € / 15,00 € / 25,00 €

La prezoj estas sen matenmanĝo, inkluzivas turisman imposton

Eblas aparte antaŭmendi tagmanĝojn en la konferencejo: 7,00 € por 1 tagmanĝo

Interesantoj pri loĝado en alitipaj, malplikostaj lokoj, junulargastejoj, kampadejoj ... - ĝis eventuala (preskaŭ)senpaga loĝado - kontaktu nin rekte, samkiel la interesantoj pri loĝado en 4-stelaj hoteloj.

Krompagoj: por mendo de loĝado post 20.03.2016: 30,00 €, post 20.04.2016: 40,00 €. **Post 30.04.2016. ni ne plu povos garantiĝi pri la prezoj de loĝado nek pri la ebleco trovi liberajn lokojn, sed ni povos klopodi.**

Aliĝkotizo (en €)

La Jara Kotizo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkotizo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoroj.

Periodo	< 2016-02-29			< 2016-04-30			Poste		
	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks
OSIEK-ano	20€	6*JK	60€	25€	7,5*JK	75€	35€	10*JK	100€
Nemembro	80€			100€			120€		
Partatempa partopreno: po 24 € tage									

* Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj.

* Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.

La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, luadon de salonoj, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, minimume unu viziton en la urbo, interkonan bufedon.

La kotizo ne inkluzivas: loĝadon, manĝojn, ekskursojn, nek ion alian ne indikitan.

La kotizo ne estas repagebla.

Pri la adekvataj san- kaj vojaĝasekuro ĉiu partoprenanto mem zorgu.

Solidareca fonduso

Bedaŭrinde, ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni en kaj kontribui al niaj konferencoj. Per via pago al « Solidareca fonduso » ni povas malaltigi konferencajn kaj loĝejajn kotizojn al nivelo akceptebla por ili.

Alveno al la konferencoj: ni volonte atendas ĉe la stacidomoj ĉiujn partoprenantojn kiuj tion petos ĝustatempe (prefere ĝis 1 monato antaŭe).

Plej facilas veni per iu el taksioj, starantaj antaŭ la stacidomoj. La veturo kostas 20 kn (enurbe, ĝis 5 km; nur ĉe iuj 25 kn). Unuopa aŭtobusa aŭ trambileto kostas 10 kn.

1 € valoras ĉ. 7,60 kn (HRK, kroata kunao)

Ciuj aliĝintoj ricevos informojn pri la dumkonferencaj ekskursoj.

Interesantoj pri la antaŭkonferencaj kaj postkonferencaj programoj petu la informojn.

Eblas plilongigi la restadon samloke kaj samkondiĉe en Osijek.

Kiel pagi : "por IEK 2016" (eventualaj bankkostoj estos eltiritaj)

La pagojn vi povas direkti al unu el la kontoj de Orbis Pictus de Visnja Brankovic ĉe:

IT / UniCredit Banca, IBAN: IT 96 J 02008 02200 000005590557

BIC SWIFT: UNCRITM1880 - Agenzia / Agentejo: TRIESTE BORSA

B / FEL: orbi-s NL / UEA: orpi-o (nur ĝis 31.03.16. kun atentigo al ni)

al OSIEK - kontoj:

FR / Poŝtkonto de la kasisto Eric Laubacher: n-ro 1 399 87 R Paris

IBAN: FR 47 2004 1000 01013998 7R02 028 - BIC: PSSTFRPPPAR

UEA: osie-h



ALIĜILO al Internacia Esperanto-Konferenco – 2016
Osijek, Kroatio / 16 - 22.07.2016.

S-ino S-ro Vegetarano Vegano

Familia(j) nomo(j): Persona(j) nomo(j):

Plena poŝta adreso:

.....

Telefonoj / fakso :

retadreso:

Mi rezervas tranoktojn por la noktoj:

- de ĝis, entute noktojn

- prefere en - lita ĉambro kun

1. en Hotel Millennium duonpensionon tranokton kun matenmanĝo nur tranokton

2. en Tranoktejo Talas kun / sen mendo de tagmanĝojn en Hotel Millenium por jenaj
datoj..... entute tagmanĝoj x 7,00 eŭroj = eŭroj kiujn mi pagos surloke.

Mi pagas per jena maniero por :

konferenca kotizo: solidareca fonduso loĝado entute eŭroj

Mi pagas samtempe kun tiu ĉi aliĝilo: eŭroj

Restas al mi por pagi antaŭ la 1-a de majo 2016: eŭroj

Mi petas la oficialan invitleteron al la konferenco (gis 30.04.2016.)

Mi interesiĝas pri:

Antaŭkonferenca restado en Harkány (HU) por tagoj (1-7, orientige)

Postkonferenca karavano al la 101-a UK en Nitra per aparta buso per mia propra aŭto

1 aldona nokto en Osijek (samkondiĉe) en Harkány (starto / haltejo de la Karavano)

aldona restado en Osijek (samkondiĉe) de 22.07 - por entute noktoj.

Aliĝilo estas plenvalida nur post la pago de la konferenca kotizo.

Dato: Subskribo:

Vian aliĝilon sendu prefere al: orbispictus@iol.it

Loka poŝtadreso: Viŝnja Branković, Vijenac I. Mestrovica 49, 31000 Osijek, Kroatio

eblas sendi/transdoni ĝin ankaŭ al: **kasisto@osiek.org**

Eric Laubacher – 8 avenue Jean Casale, F-78390 Bois d'Arcy, Francio

VIAJ ALIAJ SCIIGOJ / PETOJ / SUGESTOJ AL LA ORGANIZANTOJ

Kiel alveni al Osijek?

Osijek estas mezeŭropa urbo kiu situas vojkruĉiĝe inter 4 ĉefurboj: Beogrado - Zagrebo kaj Budapeŝto - Sarajevo.

Por atingi ĝin **aŭtomobile** el Zagrebo, Beogrado aŭ Budapeŝto vi bezonos ĉ. 2,5 horojn, el Sarajevo ĉ. 4,00 horojn. De la landlimo kun Serbio ĝi distancas 35 km, de la kroat/hungara limo 50 km kaj de la landlimo kun Bosnio kaj Hercegovino 100 km.

Aviadile vi povas alflugi al la flughavenoj de la indikitaj ĉefurboj kaj al la flughaveno de Tuzla (ĉ. 150 km, Bosnio kaj Hercegovino). Rekte al la flughaveno de Osijek mem (ĉ. 15 km de la urbo) vi povas alflugi el Londono, Munkeno kaj Frankfurto aŭ el la kroataj flughavenoj: Zagrebo, Rijeka, Split kaj Dubrovnik. www.osijek-airport.hr.

Por alveturo de la proksimaj flughavenoj inter nordo kaj okcidento (inkluzive Italio kaj Aŭstrio) konsultu ankaŭ transportistojn per busetoj : www.goopti.com , www.mistral-minibus.hu , www.travel4you.hu.

Por alveni **aŭtobuse** vi povas uzi la *gastlaboristajn busojn* el **Svislando** (Zurich, Lugano, Luzern, Basel, Sankt Gallen) kaj **Germanio**: Frankfurt, Dortmund, Kolonjo, Ulm, Stuttgart, Essen, Mannheim, Freiburg, Karlsruhe, Pforzheim, Munkeno. Pli multas tiaj busoj ĝis Zagrebo.

Per osijeka firmao Panturist d.d. kiu estas parto de DB - Deutsche Bahn estas ankaŭ *ĉiutagaj rektaj linioj* el **Germanio**: el Ulm - Stuttgart - Munchen - (Aŭstrio - Slovenio) - Osijek kaj **Slovenio**: Maribor - Ptuj (Varaždin - Koprivnica - Virovitica - Slatina) - Osijek.

El **Serbio** vi povas uzi regulajn busojn el Novi Sad, Beograd, Ŝid (po 3-4 busoj ĉiutage de kunlaborantaj kompanioj Panturist (HR), Lasta (RS), Ĉazmatrans (HR) kaj Ŝidekspres (RS). El **Hungario** vi povas busi de termalbaneja urbeto Harkany (25 km sudoriente de urbo Pecs kaj 15 km de la kroata limo ĉe Donji Miholjac) per www.app.hr kelkfoje tage.

Ene **de Kroatio** rektaj busoj ekveturas el Zadar / Split, Rijeka / Karlovac kaj tre multaj el Zagreb (www.akz.hr), de kie la veturo daŭras ĉ. 4,00 horojn. Osijeka aŭtobusa stacidomo estas estrata de www.app.hr .

Pri la **trajna** alveno informiĝu cxe www.hzpp.hr kaj www.bahn.de . Ĝi fariĝas pli malrapida ebleco, ne ofta, kun trajnŝanĝoj. Rektaj trajnoj startas en Rijeka kaj Zagrebo. Aldone vi povas veni kun ŝanĝoj en Strizivojna/Vrpolje aŭ Vinkovci. Venante el **Hungario** trajnŝanĝoj estas en vilaĝo Magyarboly (HU) kaj urbo Beli Manastir (HR).

Se vi trafus **turisman ŝipon**, al Osijek vi venus per Danubo kaj Drava, de nordo el Budapeŝto kaj Mohács, eloriente de Nigra maro tra Beograd, Novi Sad, Ilok kaj Vukovar.

Tra Osijek pasas du **internaciaj biciklaj vojoj**. La Danuba iras de Germanio tra Aŭstrio kaj Hungario ĝis Serbio, Rumanio kaj Bulgario. Eŭro Velo 6 iras de Atlantiko ĝis Nigra maro.

BONVENU, NI ATENDAS VIN!